

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-o 22

Heinrich Bandlow

Nord-germanaj Rakontoj

Tradukis
Ella Scheerpeltz



Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

GERMANA ESPERANTISTO

Monata gazeto por la disvastigo de la lingvo
Esperanto kun instrua kaj literatura aldono

ESPERANTO - PRAKTIKO

Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek

Respondeca redaktoro: Arnold Behrendt

La plej malnova el la nun ekzistantaj
E-gazetoj, redaktata ĉefe nur en Esperanto.
Ĝia ĉiam interesa enhavo konsistas el
originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj
temoj, propagando, kroniko, literaturo,
ekzercoj por komencantoj kaj progresantoj,
prilingvaj demandoj, konkursoj, biblio-
grafio, korespondo ktp.

Pri abonprezo oni demandu la eldonejon.
Por specimena numero oni sendu 0.25 Gm.
aŭ 1 novan respond-kuponon, kiuj ĉe abono
estos repagataj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.

Berlin SW 61, Wilms-Straße 5

**ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA**

N-o 22

Heinrich Bandlow

**Nord-germanaj
Rakontoj**

Tradukis
Ella Scheerpeltz

Dua eldono
(4a—8a miloj)



1924

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Alle Rechte an der Übersetzung vorbehalten
Ĉiuj rajtoj rilate al la traduko estas rezervitaj
Copyright 1924 by Ellersiek & Borel G.m.b.H.,
Berlin

Enhavo

	paĝo
Antaŭparolo	4
Ventega nokto	5
Karakterulo	14
La senplumigistoj de anseroj	21
La orakolo	31
La bastono	40

Antaŭparolo

Per la afabla permeso de la aŭtoro mi povas publikigi kelkajn rakontojn de la ŝatata humorista verkisto Heinrich Bandlow. La Esperanta traduko estas farita el la platgermana originalo en la idiomo de provinco Pomern.

Mi dankas tie ĉi la aŭtoron pro lia granda afableco.

Wall. Meseritsch (Moravio),
en Marto 1911.

E. Scheerpeltz

Ventega nokto*)

La ventego kriegis kaj bruegis dum la malluma nokto kaj blovege pelis la foliojn antaŭ si. Kia sonado estis en la aero! De malproksime venas la ventego, el la regiono, kie estas la altaj montoj kaj la granda akvo, el la malvarma nordo. Ĉio, kion ĝi ekkaptas survoje, devas kunflugi. Ĝi pelas la foliojn alten tiel, ke ili kirle flugas kaj en sia timo saltas unu super la alia. Jen ĝi permesas al ili dum momento rekonsciiĝi, ili opinias, ke nun ĉesis la sovaĝa pelado, ke ili povas trankvile malleviĝi teren — jen la sovaĝulo ree ekkaptas ilin kaj la ludo denove komenciĝas. Nun ĝi estas en la torfejo; tie ĝi trovas nenion, kun kio ĝi povus petoli, tial ĝi atakas pluvnubon, kiu ĵus volis ekpluvi — puŝegas en ĝian flankon, ĝis kiam ĝi tuj disflugas. Jen la blovulo venas en la arbaron kaj furiozas inter la arboj, kiuj ĝemas kaj krakas. Plia salto, kaj nun ĝi estas ĉe la lerneja domo, kiu staras kaŝita en arbetoj inter la du vilaĝoj. Ho, kiel ĝi ĝojkriegas, ekvidante la malnovan kadukan domon! Tie ĉi mi devas eniĝi! Per ĉiuj pordoj ĝi bruegas kaj skuas ilin, provante malfermegi ilin. Sed vane. Eĉ ne la lignan

*) El n-ro 3580 de „Universal-Bibliothek“ de Philipp Reclam jun., Leipzig.

kovrilon de la lukoj en la frontono ĝi povas deŝiri, kvankam la rustiĝintaj hokoj preskaŭ ne plu povas teni ĝin. Sed almenaŭ ĝi klakas kaj frapegas per ĝi tiom, ke la edzino de la instruisto vekiga.

„Estas ja terura vetero!“ ŝi diras mallaŭte, „ĉu vi maldormas, Fric?“

„Jes“, diras li same mallaŭte. Ili tre mallaŭte parolas, ĉar la plej malgranda infano, la plej juna el la ses idetoj, estas malsana. La unuaj dentoj volas eligi, kaj nun la infano havas febron.

Tra la fingrolargaj fendoj de la dompordo eniĝas la ventego en la domon, scivole ĝi eniĝas en la ĉambrojn kaj ĉirkaŭvojaĝas en ili.

„Kia trablovo!“ diras la virino, „se nur Linjo ne vekiga! Ha, kial oni ne rebonigas la domon ĉe ni, tie ĉi oni ja devas malsaniĝi!“ Ŝi leviĝas kaj zorge kovras la maltrankvile dormantan infanon.

Tra la fendoj de la nebone fermiĝantaj fenestroj la ventego eliĝas, ĵetas la nefirmajn lignokovrilojn kontraŭ la fenestroj, kaj jen ĝi ekvidas belan truon en la pajlotegmento. Jen estos granda amuziĝo! Ĝi komencas ŝiri kaj sublevi — vere, nun estas eble al ĝi, forŝiri la duonan kovraĵon de la tegmento. La malnovan, duone putriĝintan pajlon ĝi disŝiras kaj per la pecoj petolas. Ĝi pelas ilin ĉiam antaŭ si, jen ree alten ĝis la pluvnuboj, jen malsupren. Grandan pecon ĝi ĵetas sur la kapojn de du viroj, kiuj ĵus eliras el la vilaĝo kaj kiuj havas nigritajn vizaĝojn.

„La vetero bonege taŭgas“, diris unu el ili, „se ni rompmalfermos la dompordon, oni ne aŭdos ĝin dum tia ventego. — Raddas, ĉu vi precize scias la lokon, kie la instruisto enŝlosis la monon?“

„Jes“, diris la alia, „tion mi scias. En lia dormoĉambro ĉe la kapfino de lia lito staras malgranda ŝranko, tie li enŝlosas sian monon.“

„Estas tamen riska afero! Se li eble vekigos!“ flustris la alia.

„Ne estu timulo, Wittenborn“, diris Raddas, „tio ne malhelpos nin!“

Wittenborn silentis dum kelka tempo; tiam li ree ekparolis: „Kiom da mono li alportis hieraŭ el la urbo?“

„Mil kvincent talerojn en oro, estas mono de zorgatoj, kaj morgaŭ li alportos ĝin al la distrikta kaso; estos same bone, se ni senigos lin de tiu ĉi peno kaj la monon prenos al ni por gardi ĝin“, diris Raddas kaj akre ekridis.

„Se vi nur estas certa pri tio“, diris Wittenborn.

Raddas ree moke ekridis. „Certa? — Jen vidu!“

„Sinjoro de la vivo“, ekkriis Wittenborn, „vi ja kunprenis hakilon!“

„Jes!“ diris Raddas raŭke.

La hakilo ree estis kaŝita sub la kitelo, kaj ili rapide antaŭeniris.

„Ni bone povos helpi al ni per la mono“, reparolis Raddas, „Wittenborn, ankaŭ vi bezonas ĝin!“

„Jes“, diris serioze Wittenborn, „estas terure, ke oni venis al tia ago! Min devigas la mizerego. — Raddas, ni povas ankoraŭ reiri!“

„Iru hejmen, timulo! Vi havas la kuraĝon de malkuraĝulo! Estis vere nenecese, ke mi kunprenis vin! La monon mi sola tre bone povas uzi, kaj ankaŭ fari mi povos ĉion sola!“

La mono, la mono! Du homoj volas fordoni pro ĝi sian pacon kaj konsciencon, por du aliaj ĝi alportas grandan danĝeron. Ha, ili ne sciis, ke ankoraŭ alia speco de malbona vetero pretiĝas ekstere por ili! Kaj ĉio pro mono. Pro mono, el kiu eĉ ne pŝenigo apartenis al tiuj kvar homoj.

„Mi ne estas maljuna virino“, diris Wittenborn, „mi kunhelpos! Sed mi devas pensi ankaŭ pri la instruisto kun liaj ses vermoj.*)" La bedaŭrindulo devos ja kompensi la monon, se ĝi estos for — fine ili eble malliberigos lin! — Sed estas egale! — Antaŭen!“

La ventego aŭdis la vortojn, ĝi vidis ankaŭ ekbrili la teruran ŝtalon — neniu krom ĝi vidis tion.

Ĝi furiozis ĉirkaŭ la du homoj kaj ĵetis foliojn en iliajn vizaĝojn — sed tion ne atentis la du krimuloj. Tia vetero bone taŭgis por illa malluma vojo kaj por iliaj mallumaj pensoj. La ventego turnis sin rondon kaj rapidegis reen al la lerneja domo, kaj tie denove komencis sian ludon. La kovrilo de la

*) Infanoj.

luko! Ĉu ne estos eble kapti ĝin? La blovegulo skuas ĝin kaj klakas per ĝi, tamen la hokoj ankoraŭ tenas. Tiel ĝi ne sukcesos. De malsupre ĝi devas provi sublevi kaj rompi, refoje! — krak! rompiĝas unu el la feroj, kaj la kovrilo, falinte malsupren, brue ekfrapegas.

La malsana infano en la ĉambro ekskuigas pro ektimo kaj komencas plorkrii.

La kriado estas aŭdebla ekstere, nun ĝojkrias la ventego en la aero kaj alportas la sonon de la turhorloĝo el la urbo super la kampoj.

„Batis la dua horo“, ekstere flustras voĉo, „en tiu ĉi horo la homoj plej bone dormas!“

„Batis la dua horo“, flustras ankaŭ voĉo en la ĉambro, „en tiu ĉi nokto la dormo ne plu venos!“

La voĉo sonas ĉagrene. La viro ĵetas sin de unu flanko sur la alian. Li tre dezirus dormi — la dormo estus tre necesa por li. „Mi jam pensis, ke la vento trankviliĝos, sed ŝajnas, ke ĝi komencas denove blovegi; la malnovan luk-kovrilon ĝi eble forŝiris“, diris li al sia edzino.

Li oscedas, li estas trolacigita. Hieraŭ dum plena tago li instruis, poste li iris al la urbo por prizorgi la aferojn de sia zorganteco. Vespere li, kiam la aliaj dormis, ankoraŭ sidis kaj skribis. Li devas ja flanke de sia salajro ion perlabori, tial li skribas pedagogiajn artikolojn por gazeto. Li zorge kaj detale ellaboras ilin, la gazeto kontente akceptas la artikolojn, ĉar ili estas volonte legataj, sed

multon li ne ricevas por tiu ĉi laboro. Ĝis la dekdua horo la viro estis skribinta, pensante pri la malsataj stomakoj, kiujn li ĉiutage devas kontentigi. Je la sepa horo matene la instruado ree komenciĝos.

„Dum tia ploraĉo oni ja ne povas dormi!“ diris li.

Ankaŭ lia edzino maldormas. Tagon post tago ŝi devas atenti siajn infanojn, devas zorgi por la brutoj kaj la mastrumado, ŝi devas kuradi la tutan tagon. Tio ne estas oportuna vivo, kaj ŝi ankaŭ estas trolacigita.

„Ne riproĉu ŝin!“ diris ŝi al sia edzo, „ŝi estas malsana, kaj ni devas havi paciencon! Mi leviĝos kaj portos ŝin.“

„Tio ankaŭ ne helpas“, diris li, „mi portis ŝin hieraŭ la tutan nokton, kaj ŝi ne ĉesis plori; se ŝi do streĉis sian kri-meĥanismon, ŝi tiel longe krios, ĝis kiam la vento ĉesos blovegi!“

La edzino silente leviĝis kaj klinis sin super la malgranda lito kaj provis trankviligi la infanon per mallaŭta: „ŝŝŝ, ŝŝŝ!“ La infano ŝajne iom trankviliĝis.

La instruisto ankaŭ leviĝis. „Rekuŝiĝu“, li diras, „vi pli multe bezonas la ripozon ol mi! Aŭdu nur, kiom la vento atakas la pordon!“

Li levas la infaninon sur sian brakon, ĉirkaŭiras kun ŝi en la malluma ĉambro kaj kantetas mallaŭte: „ . . . kaj sendu viajn anĝelojn al la lit' de l' infaneto!“ — La infano retrankviliĝas, apogas la kapeton al la brusto

de la patro kaj ekdormas. Jus li volas remeti ŝin en la liton, kiam la ventego ĵetas ŝtonon de la kamentubo sur la fajrujon — denove la infano ektimas, kaj la plorkriado rekomenciĝas.

La viro kuŝigas sian karulineton, li ne estas en rozkolora humoro, tion ne kredu! —

„Raddas!“ ekstere mallaŭte diras voĉo, „la infano ĉiam kriadas! La instruisto kaj lia edzino maldormas.“

„Jes“, diras Raddas, „prenu la diablo la infanaĉojn!“

Ili ambaŭ silentas kaj ĉesigas sian laboron ĉe la seruro. Ili ne scias, kion fari.

„Ni ankoraŭ iom atendu, ĝis kiam la kriaĉulo resilentigĝos“, diras Wittenborn.

La dua nenion diras. Ili starigas sin en la niĉo de la pordo por ŝirmi sin iom kontraŭ la ventego kaj pluvego. Pluvigis, kvazaŭ la akvo estus verŝata per trogoj.

„Nun la infanaĉo ŝajnas silenti“, ekparolis Raddas, „mi jam pensis, ke la malbenita aĉulo tute malhelpos nin.“

„Iomete ni ankoraŭ atendu, ĝis kiam ili ree dormos“, respondis Wittenborn.

Ili staris dum kvaronhoru, kaj ĵus Raddas metas la manon sur la seruron por derompi ĝin. Jen ili aŭdas la krakon de la ŝtono sur la fajrujo — ree ili aŭdas la infanon plori — kaj denove ĉesas agi. Se ili estus tiaj ŝtelistoj, kiajn edukas la grandurbo, ili jam delonge estus malfermintaj la malnovan pordon, sed ili ne estis spertaj en tia laboro kaj ankaŭ ne posedis ilojn por ĝi.

Senmove ili staras. La infano eble ree ekdormos. La instruisto iras nudpiede tien kaj reen — li ankaŭ riproĉas la infaneton, ke pro la kriado li perdas la noktan ripozon. „Linjo, malgranda blekulo, vi vere ne bezonus tiel konduti!“ Post kvaronhoro li diras: „Mi jam sentas malvarmon.“ Li serĉas alumetojn kaj ekbruligas la lampon. Poste li vestas sin, lia edzino ankaŭ, kaj li sidiĝas ĉe la tablo por daŭrigi la skribadon. Tio ne estas io nova por li, jam ofte li faris tiel!

Raddas ŝteliras ĉirkaŭ la domo. „Jen“, li diras kolerege al sia malbona kunulo, „nun li faris lumon! Tie ĉi tra la fendo vi povas vidi lin, kie li sidas. Nun ni povas jam foriri. — Malbenita infanaĉo!“

Ankoraŭ ili staras momenton.

„Nenio estas farebla“, fine diris Wittenborn, „la mono ne estos nia!“

Raddas elprenas la hakilon el sub la kitelo. Li devas iel liberigi sian koleron kaj per tuta forto li ekbatas kontraŭ la fenestro tiel, ke la ligna kovrilo disfalas kaj tri fenestro-vitroj disrompiĝas. — Poste ili forkuras.

„Sinjoro de la vivo!“ ekkrias la instruisto, „kion signifas tio ĉi?“ — Li ekprenas fortikan bastonon, kaj kunprenante la lampon, li iras eksteren. Neniu estas videbla. Nur en la mola ligno de la fenestro-kovrilo, kiun li portis en la ĉambron, oni vidis la postsignon de la hakilbato.

Kiam li vidis ankaŭ la malfermitan seruron, li ekkomprenis.

„Vi bona, kara infano“, li diras kaj kisas la malsanan filineton sur la varmegan kapeton, „vi ja gardis nin kontraŭ malbono — kaj kiu scias, kontraŭ kio plia! En tiu ĉi nokto vi estis certe nia gardanta anĝelo, kaj mi ne-komprenanta homo eĉ riproĉis vin!“ La infanino daŭrigis la ploradon, kaj nur en tagiĝo ŝi trankviliĝis ekdormante.

La ventego pro plezuro ne sciis, kion fari, ĝi ridegis, ĝi petolis kvazaŭ stratbubo, ĝi saltis kaj bruis tra la vilaĝoj, ĝardenoj, kampoj kaj herbejoj. Kiom ĝi povis ekkapti, tiom da tero ĝi prenis de la kampoj kaj ŝutis ĝin sur la herbejojn, ĝi ekpelis la akvon de la lago kaj plaŭde ĵetis la ondojn sur la straton, ree ĝi kaptas la foliojn kaj furioze pelas ilin, ĝojkrias kaj blekas tiel, ke ili flugegas pro timo, ĝis kiam ili svene falas post kreskajbarilon. Ĝi forŝiras la malnovan, malpuran ĉapelon de Raddas, ludas kun ĝi, kaj fine ĵetas la ĉapelon antaŭ la pordon de la instruisto. Kiam matene la infanoj iris en la lernejon, unu el ili kunprenis la ĉapelon.

„Al kiu ĝi apartenas?“ demandis la instruisto.

La knaboj ĉirkaŭrigardas la objekton kaj Karlo Raddas diras: „Estas la ĉapelo de mia patro.“

Karlo alportis la ĉapelon hejmen al sia patro. „Mi tuj rekonis ĝin!“ diris li, kaj pro tio li ricevis nukbaton de sia patro.

Karakterulo*)

Petro Fretendüwel heredis de sia patro tiun ĉi belan kaj larĝan nomon kaj krom tio ankaŭ belan larĝan domon. Ankaŭ belan larĝan vizaĝon li heredis, kaj belan larĝan ventron li alnutris al si. Li havis tiel nekarakterizan „ĉiutagan“ vizaĝon, ke ĉiuj, kiuj parolis kun li la unuan fojon, demandis lin: „Ĉu mi eble jam vidis vin ie?“ Tion li devus aŭdi, se li eĉ elmigrus Richtenberg-on — aŭ eĉ Turkujon.

Kiu lin konas pli bone, tiu diras, ke Petro estas obstina, malvigla rentulo, kiu tagon post tago sidas sur verda apogseĝo apud la fenestro, fumante ĉe tiu ĉi laboro el sia pipo kaj krom tio ankaŭ rigardante jen la gazeton, jen la straton, ĝis kiam li estas plenigita de novaĵoj kiel botelo, — sed kiu ĉiumatene devas esti plenigata denove.

Do Petro Fretendüwel havas belan, larĝan domon, kiu por li sola estus eĉ tro granda, kaj en kiu li sentas sin kiel pizo en granda skatolo. Ĉar li estas meditema homo, li forluis la supran etaĝon de la domo al tiaj homoj, kiuj ne povus diri al li: nun oni devas fari tion, aŭ:

*) El n-ro 4098 de „Universal-Bibliothek“ de Philipp Reclam jun., Leipzig.

estas bezone, ripari tion! — kaj per tiaj paroloj tedi lin. Sed Petro estis ankaŭ konservativa homo, kiu nenion volis scii pri novaj manieroj, precipe, se li devus pagi monon por ili. Kiam do la luanto trosatiĝis rigardi la fumnigritajn tapetojn, la rustiĝintajn pordojn kaj la paserojn kaj vespertojn sub la tegmento, — tiam li transloĝiĝis en alian loĝejon, kaj Petro diris: „Nu, mi ne miras pri tio“, ĉar li estas karakterulo kaj eĉ ne iomete ofendsentema. Tiam li denove atendis, ĉu trovos sin amanto por lia „rabist-kaverno“, sed ripari ion li ne permesis.

Tiel lia bela loĝejo ree estis sen luanto, kiam nova bestokuracisto venis en la urbon por tie ekloĝi.

Petro fumis el sia pipo ĉe la fenestro, tamburis per la fingroj kaj rigardis la veteron, kiam iu frapis. La pordo malfermiĝis, kaj la bestokuracisto eniris kaj prezentis sin. „Mi estas nomata Peiters“, li diris, „kaj deziras vidi la loĝejon en via domo, sed Dio! — ĉu mi ne vidis vin iam? Vi ŝajnas al mi tiel konata!“ — „Lasu nur! Min ĉiuj homoj vidis jam ie!“ respondis Petro. „La loĝejo ĵus estas neloĝata, kaj tio devenas de tio, ke la lasta loĝanto transloĝiĝis.“

„Jes“, diris Peiters, „ordinare tio devenas de tio. Estas bela, granda domo, la via!“

„Tia ĝi estas“, respondis Fretendüwel, irante kun sia gasto en la etaĝon. — Kiam ili iris tra la ĉambroj, la bestokuracisto tiel sur-

priziĝis kiel la akaro, kiu sidis tiel agrable en la fromaĝo kaj subite falis sur la plankon.

„Tie ĉi aspektas ja ĉio diable malbele“, li diris. — „Tiel estas, sed tio ne malutilas“, respondis la dommastro, „tie ĉi loĝis jam multaj homoj, kaj plaĉis al ili sufiĉe bone.“

„La tapetoj krevis!“

— „Jes, tion ili faris.“

„La plafonoj estas nigregaj!“

— „Jes, tro blankaj ili ne estas.“

„Tiuj ĉi malnovaj flavaj fornoj ne plu estas laŭ modo!“

— „Ne, ili jam staras dum kvardek jaroj.“

„La plankoj estas tro eluzitaj!“

— „Jes, la plankoj estas jam malnovaj.“

„La pordojn de la ĉambroj oni devus laki!“

— „Jes, tio estus bona.“

„La fenestrojn ankaŭ!“

— „Jes, ilin ankaŭ!“

„Do, vi bonvolos ordoni, ke oni riparu ĉion ĉi!“

— „Ne sinjoĉjo, tion mi ne faros.“

„Sed en tian loĝejon mi ne povas enloĝiĝi!“

— „Do nenlo helpas; vi do ne povos enloĝiĝi.“

„Sed mi estas en embaraso, ne povante trovi ĝustan loĝejon! Mi tie ĉi povus loĝi dum dek aŭ ankoraŭ pli multe da jaroj!“

— „Nu, do ekloĝu!“

„Sed se tie ĉi aspektas ĉio tiamaniere — ne estas eble!“

— „Nu, sekve ne.“ — — — — —
— — — — „Kiom da lupago mi devus doni?“

— „Ducent Markojn, tiom mi ĉiam ricevis.“

La bestokuracisto pripensadis . . . „Nu tro multe tio ne estas; mi ja povus ĉion mem renovigi, ĉu ne?“ — „Tion vi povas fari.“

„Mi eĉ ne komprenas, ke tie ĉi povis loĝi homoj!“

— „Nu, tion vi diras! Unu volas tion, alia ion alian. Unu volas la patrinon, alia la filinon, kaj iuj volas eĉ la servistinojn, kiel oni rakontas!“

„Do mi volas ekloĝi tie ĉi kaj ordonos fari ĉion necesan, kaj ni faros lukontrakton!“

— „Ne, tion ni ne faros! Tio ne estas modo tie ĉi, kaj mi nenion subskribos!“

„Vi estas tre obstina homo!“

— „Povas esti. Ebleco ekzistas. Mi lasas ĉion tia, kia ĝi estas. Maljuna pudelo ne plu lernas novajn artifaĵojn.“

„Sed ni interkonsentas, ke vi pli malfrue ne plialtigos mian lupagon!“

— „Tion mi ĝis nun neniam faris kaj ankaŭ ne faros.“

„Nu bone, do ni interkonsentas!“ —

„Bone!“

La bestokuracisto sendis metiistojn, por ke ili laŭforte laboru en lia nova loĝejo. Tie oni pentris, lakis kaj gluis; el kvar malgrandaj fenestrovitroj oni faris unu grandan, blankajn kahelfornojn oni metis anstataŭ la

malnovaj, kaj novan muron oni konstruis por ricevi el la koridoro malgrandan antaŭĉambron. Kiam la bestokuracisto fine ekloĝis inter la novaj belaĵoj, li estis je kvincent Markoj pli malpeza, tamen tre plaĉis al li en la loĝejo, kaj ankaŭ lia dommastro plaĉis al li, ĉar ili reciproke tute ne interkomunikis. Ĉiuj vizitantoj de la bestokuracisto ĝojis pri lia eleganta loĝejo.

Dum duonjaro li estis loĝinta tie, kiam li iris viziti sian dommastron por alporti la lupagon. Petro ĵus tamburis per la fingroj sur la fenestra breto kaj rigardis muŝon, kiu zumis ĉe la fenestrovitro. „Nun la loĝejo estas belega, sinjoro Fretendüwel“, diris bestokuracisto Peiters. — Petro konsente mallevis la kapon. „Mi jam aŭdis pri tio“, diris li. — „Jen estas cent Markoj da lupago!“ diris la luanto. „Bone! estas ĝuste cent Markoj.“ —

„Mi devas ankoraŭ eliri hodiaŭ, adiaŭ do, sinjoro Fretendüwel.“

— „Adiaŭ!“ Petro donis al sia luanto la manon kaj akompanis lin ĝis la pordo, tie li diris: „Ĉar estas okazo por demandi: kion ni interkonsentis pri la lupago? Mi jam forgesis!“

„Vi ne volas plialtigi mian lupagon!“

— „Vere, tiel estis!“

„Nu tio restos tiel, mi esperas!“

— „Certe! Kio estas akceptita, restas akceptita!“

„Nu, tiam adiaŭ!“

— „Adiaŭ do! Nur mi volas ankoraŭ diri, ke vi devas transloĝiĝi post duonjaro.“

La bestokuracisto ektimis. „Kion?“ li kriis, „kion vi diras?“

— „Mi diras, ke vi devos transloĝiĝi.“

„Kion signifas tio ĉi?“

— „Nu, sinjoĉjo, plialtigi la lupagon mi ne povas, pri tio vi havas mian promeson. Sed la loĝejo estas nun tiel bela, ke ĝi valoras kvarcent Markojn da lupago, kaj tiom oni proponis al mi, tial vi devas transloĝiĝi. La plejmulton mi plej multe preferas.“

Bestokuracisto Peiters denove eniris la ĉambron kaj kunfrapis la manojn super la kapo. „Vi estas ja vera — —“ li kriis, sed la lasta vorto restis en lia gorĝo, „mi pensis, ke mi loĝos tie ĉi dum tuta mia estonta vivado“, li diris fine.

— „Jes, jes, tiel estas! Kion valoras ĉiu homa kalkulario kaj antaŭpensado, beno de Dio estas donaco, kiu venas per si mem!“ Petro Fretendüwel kunmetis la manojn super la stomako kaj pie rigardis la muŝon. La bestokuracisto tordis siajn lipharojn kaj ne sciis, kion diri aŭ fari.

— „Transloĝiĝu, sinjoĉjo, transloĝiĝu, ie alie ankaŭ estas bele, kaj anseroj iras ĉie nudplede!“ —

„Nun mi aranĝis ĉion tiel bele kaj elspezis tiom da mono! Tio estas vere malicega! Hm — jes, — ne, mi ne faros ĝin, — sed kion fari? Kien mi iros? — Se mi mem donus al

vi kvarcent Markojn, ĉu mi povus loĝadi plue en mia loĝejo?"

— „Kompreneble, vi havas la plej unuan rajton!"

La bestokuracisto pro kolerego kaj indigno preskaŭ ne povis trovi vortojn.

„Belega tio estas“, li diris, „unue mi renovigas la tutan loĝejon, kaj poste mi devas pagi por ĝi duoblan lupagon! Gardu sin ĉlu kontraŭ la dik-kapaj rentuloj!"

— „Sinjoĉjo, kion vi parolas? Vi ja mem ne volas alie! Vi ja mem proponis al mi tiun ĉi lupagon! Mi faras nur, kion vi volas!"

Sed la bestokuracisto ne plu aŭdis tion, li estis jam forkurinta el la ĉambro.

La senplumigistoj de anseroj*)

Sinjoro advokato Sliker sidis ĉe la tablo, sur kiu staris botelo da vino, kaj ludis per la dika ora ĉeno, kiu pendis sur lia dika ventro, kaj li rakontis al sia amiko Bekman: „Ordinare kredas la homoj, ke mi kaj mia kolego Torkirken estas la plej grandaj mal-amikoj, ĉar en la juĝejo ni atakas nin reciproke, kvazaŭ ni volus tuj kapti unu la alian ĉe la gorgo, tamen ni estas paro da veraj amikoj. Nur pro prudento, sinjoro Bekman! Ni ambaŭ gajnas per tio. Mi helpas al li akiri klientojn, kaj li helpas al mi. Nenio pli bona ol interkonsento, sinjoro Bekman!“

„Sed se la homoj, kiuj procesas, ankaŭ pensus tiel?“ demandis sinjoro Bekman.

„Tio estus abomena por ni advokatoj!“ diris sinjoro Sliker kaj ridis. „Ni tie ĉi certe ne povus trinki vinon! Vlan sanon!“

Kaj la du bonaj sinjoroj faris dankoferon per sia trinkado al Dio pro tio, ke la homoj estas tiel bonege malsaĝaj kaj procesadas.

*) El la libro „Ut min Käk“ (El mia kuirejo), eldonita de Bruncken & Cie., Greifswald.

Subite iu forte frapas la pordon, kaj vilaĝano Kurr, maljuna, maldika kaj seka viro starigas sin kiel mejloŝtono apud la pordo de la ĉambro kaj komencas longan rakonton pri sia najbaro Nüdling: „Li forigis malnovan, kadukan stalon, kiu limis al mia korto, kaj en tiu stalo estis kvar fenestretoj, pro kiuj mi ĉiam koleradis. Jen liaj servistoj ĉiam ĵetis sur mian korton ostojn, ĉifonojn kaj ne plu uzeblan ledajon de jungilaro, kaj mi supozas, ke ili per tiuj fenestretoj faris ankaŭ katvizitojn ĉe miaj servistinoj, kaj nun, kiam Nüdling konstruas novan stalon, li denove volas fari kvar fenestretojn en ĝi! Kaj mi ne volas tion permesi. Kiu nun estas prava? Ĉu mi devas toleri tion?“

„Ne! Vi estas prava! Ne necesas, ke vi tion toleru! La plej supera tribunalo ĵus decidis en simila afero. Atendu momenton!“ — Li serĉis en amaso da kajeroj kaj post nelonge trovis, kion li serĉis. „Unu juĝo estis la sekvanta: La akuzito estas kondamnita, malantaŭenigi sian novkonstruaĵon de la malsupra rando de la frontona fenestro de l' provizejo de la akuzantino tiom, ke el super la jam estanta frontona fenestro farita samspeca fermita frontona fenestro de super la jam ekzistanta dua etaĝo supozite konstruota tria etaĝo, meze granda homo, staranta rekte en senĝena teniĝo, kies starloko antaŭ la fenestro estus tiel elektita, ke lia rigardo antaŭen trafas la vitron de la fenestro $16\frac{2}{3}$ centimetrojn super ĝia malsupra rando, per supren direktita

rigardo povus en la tuta larĝo de la fenestro ankoraŭ vidi la ĉielon.*)" — Tute la sama afero — hm — kiel la via tio ne estas, sed tamen — hm — simila! Nun vi ĉion komprenis, ĉu ne? La juĝo estas ja treege klara!"

„Jes! Simile mi tion imagis, kaj tion mi nur volis scii! Vi do akceptos la proceson kontraŭ Nüdling?"

„Certe! Jes! Tion mi faros! Do adiaŭ, adiaŭ!"

„Fine!" diris la advokato, kiam la vilaĝano estis foririnta. „Tio almenaŭ ree fariĝos bona proceso! Mi jam pensis, ke la vilaĝano konservis en salo sian procesemon. De kiam li do ne plendis pri io? Vidu, preskaŭ duonjaro pasis de lia lasta proceso!"

Sinjoro advokato Sliker kaj sinjoro Bekman do gaje daŭrigis la trinkadon, kaj nova botelo estis alportata el la kelo, ĉar ĉe tiu ĉi proceso certe estos gajnataj kelkaj boteloj da vino.

La du sinjoroj ĵus agrable interparolis, kiam ree iu frapis la pordon kaj vilaĝano Nüdling eniris la ĉambron, ankaŭ unu el la maljunaj necedemuloj, kiu nun komencis rakonti la saman aferon pri la stalo, sed laŭ sia propra vidpunkto: „La afero estas tia! Mi ne estus veninta tien ĉi, sed mia najbaro Kurr ne volas permesi, ke mi ree faru

*) La leganto volu afable pardoni tiun ĉi „specimenon" el la juĝoficeja stilo! (Rim. de la trad.)

la kvar fenestrojn en mian novan stalon. En la malnova stalo, tion mi devas diri al vi, estis do kvar fenestroj, kiuj rigardis en la korton de Kurr. Agrabla tio ja ne estas por li, tion mi komprenas. Miaj servistoj jetas ĉiuspecan maltaŭgan malnovaĵon, ĉion, rompitaĵojn kaj potojn tra la fenestretoj sur lian korton, kaj rigardas tra ili kaj povas vidi ĉion, kio okazas en lia korto, kaj li eĉ ne povas konstrui stalon kontraŭe de mia, ĉar mi ja havas la rajton pri la fenestroj, kaj nun mi volas demandi, ĉu mi ree povas fari en mian novan stalon la fenestretojn, la malnovan stalon mi malkonstruis!“

„Kompreneble vi povas! — Fenestrorajto!“ diris la advokato kaj purigis siajn okulvitrojn.

„Nun, do ĉio estas bona! Rajto devas ja resti rajto, kaj mi tuj diris, ke mi estas prava!“

„Certe, vi estas prava! Sed mi diros ion al vi: mi ne havas tempon kaj tute ne povas tiun ĉi fojon akcepti vian aferon. Iru al Torkirken, li faros la aferon same bone kiel mi, kaj pri fenestroj li estas speciale sperta. Atendu momenton, nur malgrandan momenteton, mi nur skribos kelkajn vortojn al li, kiuj klarigos la aferon, nur kelkajn vortojn mi skribos!“ Kaj la advokato skribis sur papereton: „Carpo meum anserem, carpestuum“, kaj li amuziĝis pro tio el la fundo de sia animo. „Jen!“ li diris kaj ekridis. „Tion vi alportu al sinjoro Torkirken, mi ĉion priskribis.“

„Bone! Mi dankas! Tio tre rapide estis farita!“

„Ĉio en ordo! ‚Mi dankas‘ estas nutraĵo, per kiu jam kelkaj tajloroj mortnutris sian katon!“

„Kion vi diris?“

„Ho ne grave! Adiaŭ do, adiaŭ!“

Kiam la vilaĝano estis foririnta, diris sinjoro Bekman: „Sed nun diru al mi! Antaŭe vi diris al vilaĝano Kurr, ke li estas prava, kaj poste vi diras al Nüdling, ke li estas prava, Ja nur unu povas esti prava!“

„Certe, sinjoro Bekman, en tiu ĉi afero vi estas prava!“ diris la advokato, ridante per sia tuta ruĝa kaj grasa vizaĝo kaj ludis per la dika, ora horloĝa ĉeno sur sia dika ventro.

Vilaĝano, Nüdling foriris, kaj ĉar en lia vojo troviĝis bonreputacia gastejo, li eniris.

Tie estis nur studento, kiu filozofadis, sidante post glaso da biero. Vilaĝano Nüdling sidiĝis apud li kaj rakontis, al kiu li iros kaj pro kiu afero.

„Kio estas skribita sur la papereto, pri kiu vi parolis?“ demandis la studento.

„Nu, mi ne povas kompreni ĝin! C a r p o ĝi komenciĝas. Hundonomo tio ne estas, kaj germana tio ankaŭ ne estas. Jen estas la papereto. Je la fino staras tie t u u m, per tio

li celas al Kurr. Sed — se mi tion bone scias — germane la vorto komenciĝas per „d’ kaj estas ankaŭ iomete alie skribata*)!“

La studento ridegadis, kiam li legis la skribitaĵon.

„Ne, maljuna amiko“, li diris, „tio signifas la jenon: Mi senplumigas mian anseron, senplumigu vi la vian!“

„Ke li ricevu spasmon en la ventron! Ne povas esti tiel! Vi petolas kaj mokas min!“

„Se vi ne volas kredi al mi, iru al la rektoro, li scias la latinan lingvon! Vi devas postuli, ke la advokato duelu kun vi! Mi estos via sekundanto!“

„Nu, vi tion ne scias, nur li postulas, li nenion donus al mi. Sed al la rektoro mi tuj iros. Sub lia granda ĉapo kaŝiĝas multe da saĝeco!“

Kaj li iris al la rektoro, kiu ĵus per ruĝa inko laboris en la skrib-kajeroj.

„Nu, amiko, kion vi volas?“ demandis la rektoro.

„Ha, mi venas nur pro tiu ĉi papereto! Mi ja scias legi gazeton kaj la malgrandan Struk-kalendaron, sed tiu ĉi skribaĵo estas tro sciencula por mi! Tial mi pensis, ĉar vi ja eldraŝas la sciencon ĝis lasta pajlero, vi eble diros al mi, kion signifas tio ĉi! Homo ja ĉiam devas lerni ion, ĉar la vivo estas longa, kaj la pensoj estas mallongaj —“

*) La germana vorto „dumm“ signifas „mal-saĝa“.

„Kaj via edzino estas dika, k. t. p.! Nu donu al mi la papereton!“ Kaj la rektoro legis: „Mi senplumigas mian anseron, senplumigu vi la vian!“

„Fulmotondro! Ĉu vi ankaŭ naskiĝis dum frosta vetero? Estas ja neeble!“

La rektoro demandis pri la deveno de la skribaĵo sur la papereto, kaj kiam li scilis ĉion, tio tre amuzis lin: „Do tia estas la afero! Jen humorplena animo! Vere, ne vulgara esprimo!“

La vilaĝano gestis per la manoj, kvazaŭ iu proponus al li duone tro malgrandan prezon por lia porko, foriris kaj pensis: „Trifoje, laŭ burĝa rajto!“ La afero ŝajnis al li tre nefidinda, tial li decidis iri al la pastro. „La pastro“, pensis li, „parolas al ni almenaŭ en nia maniero, sed la rektoro? Ĉiam nur fiere de supre! Li estas de la sama speco kiel la studento!“

Do Nüdling iris al la pastro.

La pastro prenis la papereton kaj legis: „Mi senplumigas mian anseron, senplumigu vi la vian! — Kion signifas tio ĉi? Kiu skribis ĝin, kaj kion vi volas scii pri ĝi?“

Vilaĝano Nüdling rakontis do la tutan aferon pri la proceso kaj je fino li diris: „Kaj poste la advokato skribis tion sur tiun ĉi papereton, kaj dum lia plumo saltetis sur la papero, lia nazo kuris post tiu ĉi fremdlanda germanaĵo, kvazaŭ kato post muso.“

„Atendu momenton“, diris la pastro, mi dum momento eliros. Sidiĝu tie ĉi kaj ekfumu cigaron, jen, prenu! Tie ĉi estas alumetoj!“ Kaj efektive, post tre mallonga tempo la pastro

revenis. „Kaj nun“, diris li, „rakontu al mi denove la historion, sed tre detale!“

„Ĉu vi poste ankaŭ volas skribi ion sur papereton?“ demandis malkonfideme la vilaĝano.

„Ne, tion mi ne intencas! Sed mi volas precize scii la aferon pri la proceso. Do vi volas uzi kontraŭ via najbaro la tutan forton de la leĝo?“

„Hm! Kial ne, se mi ja estas prava?“

„Nu bone! Kaj nun denove rakontu tre detale!“

La vilaĝano ree komencis rakonti tre detale kaj tre fervore, kaj ankoraŭ longe ne finis, kiam iu frapis la pordon, kaj poste eniris vilaĝano Kurr. La pastro estis sendinta al li sciigon, ke li venu momenton.

„Nu?“ demande diris la pastro. „Ĉu vi do ne volas saluti per manpremo vian najbaron?“

Do ili faris tion, kvankam iom nerapide.

„Vi sciu“, ekparolis la pastro, „hipotekoj kaj procesoj estas la solaj kreitaĵoj, al kiuj mi deziras plej baldaŭan morton per rapide konsumanta ftizo!“

Poste li metis la fingropinton sur la bruston de Nüdling kaj diris solene: „Kiu scias, kiam la falĉilo de la morto vin rikoltos —“

„Bona Dio, sinjoro pastro, kiel vi povas timigi homon!“

Poste li tuŝetis per la fingro vilaĝanon Kurr kaj diris per profunda, timiga voĉo: „Ni migras en malluma valo —“ Kaj poste li ek-

tondris per vilaĝana parolmaniero kaj riproĉis kaj admonadis ilin. Kaj kiam honesta pastro tiamaniere predikas, tio certe efikas je la aŭskultantoj.

„Vi ne vidas la marĉon pli frue, ol ĝis kiam vi kuŝas en ĝi — la infera ventmuelisto nur atendas je la homa malforteco. Vintre vi ne iras en preĝejon kaj somere vi dormas tie! Vi ne malpacu inter vi kaj ne konservu la koleron. — Kurr, vi donis al la preĝejservisto dudek pfenigojn, por ke li ne veku vin en la preĝejo. — Paco nutras — malpaco formanĝas! — Tia proceso pro fenestraĉo povas fariĝi pli multekosta ol aĉetprezo por vilaĝa bieno! En la juĝejo la advokatoj atakas sin reciproke kvazaŭ malamikaj ĉenhundoj, kaj poste ili estas la plej bonaj amikoj kaj skuas al si reciproke la manojn! Estas simile kiel ĉe la du partoj de la tondilo, ili ankaŭ ŝajne atakas unu la alian, sed ne difektas sin, sed gardu Dio tiun, kiu venas inter ili! De la advokatoj vi povas lerni interkonsenton!“

Tiel laboris la lango de la pastro, fine li diris: „Kaj nun ni pace interkonsentos, kaj mi skribos la protokolon!“

„Interkonsenti?“ demande diris Kurr, kaj lia voĉo sonis iom neklare.

„Certe!“ firmavoĉe respondis la pastro tiel decide, ke tio ne permesis kontraŭdiron. „Ni faros interkonsenton! Diru, Nüdling, ĉu ne sufiĉus du fenestretoj en via stalo?“

„Nu — ili eble sufiĉus!“

„Do, tiukaze ĉio estas en ordo! Kontraŭ du fenestretoj vi ne protestos, ĉu jes, Kurr?“

„Se sinjoro pastro opinias tiel, eble devos esti tiel!“

„Bone! Poste mi ĉion laŭvice skribos. Kaj nun ni ĉiuj tri iros en gastejon kaj manĝos anserrostaĵon, ni honeste gajnis ĝin, kaj botelo da vino ankaŭ restos por ni ĉe tiu ĉi afero!“

Kiam poste ili pace kaj konsente laboris inter la ostoj de la ansero, la gastejmastro devis skribi jenan leteron:

„Estimata sinjoro! Edimus nunc anserem carptum!“

La vilaĝanoj subskribis tion ĉi, kiam la pastro estis dirinta al ili, ke tio signifas proksimume la jenon: „Ni mem senplumigis la anseron kaj formanĝis ĝin.“

Tiun ĉi leteron la domservisto alportis al la advokato kaj krom ĝi ankaŭ faskon da anserostoj envolvitaj en gazetpapero. La domservisto poste rakontis, ke dum la legado kaj rigardado la kolo de l' sinjoro advokato subite longiĝis, kaj ŝajnis, ke li nur pene povis gluti, kiel kokino, kiu ne povas engluti kolbasŝelon.

La orakolo^{*)}

„Bonan vesperon, sinjoro Stannarius“, diris la maljuna apotekisto Bok al sia farmaciisto, „jen mi estas ree tie ĉi! Bela vojaĝo estis tio! En la tuta Norda Maro svarmis homoj, viroj kaj virinetoj; sed mi ne multe banis min, por mi la akvo estas tro malseka kaj malvarma. Sed bonan apetiton mi akiris en la freŝa mar-aero! kie estas nia Lino?“ — „Lino! Linjo!“ li vokis en la koridoron. La servistino alkuris.

„Bonan vesperon, Lino! Nun mi ree estas hejme! Jen! Forportu la kofrojn kaj skatolojn! Haltu! Tiun ĉi malgrandan pakaĵon vi devas porti en la kuirejon, en ĝi estas la pasamentaĵoj por sinjoro Stannarius! Al ĉiu mi alportis ion. Jen vidu, Lino, tie ĉi estas monujo el foka ledο, zorgu, ke vi konstante havu en ĝi propran monon. Kion vi ricevos, sinjoro Stannarius, tion vi ekvidos post unu horo! Kiel mi konas vin, mi certe ĝuste elektis! Por vi monujo ne taŭgas, ĉar mono fariĝas ĉe vi tro forkurema.“ —

Kaj la maljuna gaja sinjoro rigardis ilin ambaŭ tre bonhumore, skuis iliajn manojn, kaj Lino dankis al li, sed Karlo Stannarius ridis

^{*)} El la libro „Ut min Käk“ (El mia kuirejo), eldonita de Bruncken & Cie., Greifswald.

per sia tuta ronda vizaĝo kaj diris: „Mi dankas al vi jam antaŭe, sinjoro Bok; sed mi estas tre scivola pri tio, kial mia donaco devas resti en la kuirejo!“

„Vi nenion malkaŝu, Lino, ĉu vi aŭdas? Do, nun mi iros en mian ĉambron por iom ripozi dum unu horo. Venu, Lino, mi informos vin ankoraŭ pri la malfermo de la pakaĵo!“

Tiel Karlo Stannarius restis sola en la apoteko kaj estis tiel brule scivola, ke li tre ofte frotis la nazon kaj gratis la genuon. Kaj ĉar li en la apoteko havis nun neniun alian laboron ol viŝi polvon, kion li pro sia eksciteco ne volis fari, li starigis sin antaŭ la dompordo, vokis el la poŝta domo Hajdi-n, la hundon, kiu estis bonega amiko de li, kaj ludis kun ĝi. Li saltigis ĝin, ordonis al ĝi boji kaj movadi la voston, sed tio ankaŭ nur dum mallonga tempo povis lin distri; poste li ree pensis pri la pakaĵeto kun pasamentaĵoj, kaj, mallaŭte paŝante, li iris al la kuirejo. Tie staris Lino antaŭ la fajrujo kaj atendis, ĝis kiam bolos la akvo, kaj sur la tablo rampis granda viva omaro.

„Ho“, pensis Karlo, „nun mi scias ĉion!“

„Kion vi serĉas tie ĉi?“ diris Lino. „Vi ja ne devis vidi la beston, antaŭ ol mi alportos ĝin al la tablo!“

„Por tio nun estas jam tro malfrue, Linjo! Mi jam vidis ĝin. Tondro kaj fulmo, kia ekzemplero! Ho, kiel ci bongustos al mi! Jes, la maljunulo scias, kio taŭgas por farmaciista stomako!“

Li ridis per la tuta vizaĝo kaj viŝis sian buŝon pro antaŭsento.

„Diru al mi, kia besto ĝi estas?“ demandis Lino, kiu dum sia vivo ankoraŭ vidis nek omaron, nek kankron. Por ĉiu tio estos komprenebla, se mi rakontos, ke jam de multaj jaroj regis la kankropesto, kiu devenis de la vaporŝipoj kaj de la multaj grandaj fabrikejoj kaj ankoraŭ aliaj diablaj eltrovitaĵoj, pro kiuj niaj vilaĝanoj perdas sian prudenton kaj la kankroj ricevas la peston.

Karlo Stannarius ricevis post la demando de Lino — kvankam ne la kankropeston, tamen ŝercan ideon.

„Kia besto ĝi estas, vi demandas? Nu, ĝi estas orakolo!“

„Orakolo? Kio estas tio?“

„Nu, orakolo origine estas greka idolista dio, kiu faras la veteron kaj ĉion akurate antaŭscias, precize tiel, kiel nun la poŝto, kiu ja ankaŭ komencas antaŭdiri la veteron, aŭ kiel nia kartodivenistino kun la lipharoj. Tia orakolo scias pri ĉiuj aferoj de la aliaj homoj kaj malfermegas la pordojn de ĉiuj sekretoj tiel, ke ĉiu povas enigardi. Vidu, Linjo, tiu ĉi besto scias antaŭe, ĉu la kuiristino, kiu kuiros ĝin, havas sekretan fianĉon, ĉar se ŝi havas tian, la besto pro honto fariĝos tute ruĝa.“

Dirante tion ĉi, Karlo Stannarius faris tiel senkulpan mienon, kiel nur al li estis eble fari. Linjo estis bona knabino, sed ne havis pli multe ol puran konsciencon kaj pian, naivan

kredon. Tamen ŝi ne tiel rapide akceptis kiel veron tian rakonton.

„Ree vi havas malsaĝaĵojn en la kapo“, diris ŝi, „se la besto do fariĝos verda, vi estas enamiĝinta, ĉu ne?“

„Ho, Lino, haltigu vian logikon!“ diris la farmaciisto.

„Kion? Logikon?“ kriis la servistino. „Mi estas honesta knabino! Kion vi pensas? Pri logiko mi tute nenion scias!“

Stannarius ridis kaj diris: „Vi estas en la saĝaj jaroj, Linjo, sed via virto tamen ricevis ekpuŝon per kelkaj vesper-promenadoj, kaj vi eĉ ne promenis sola! Nu, vi ja ekscios ĉion per la orakolo!“

„Kia malsaĝa parolaĉo tio estas pri virto kaj promenado? Tio tute ne koncernas min. Kion vi diras, valoras precize tion, kion elgratas la kokinoj!“

„Kion ili elgratas, Linjo?“

„Nun foriru fine el mia kuirejo!“

Do Stannarius foriris el la despotejo de Lino, kaj Hajdi bojante kuris post li kaj ĝojblekis, kiam la farmaciisto en sia favora kaj petolema humoro permesis al ĝi, salti trans la brakon. Kaj post nelonga tempo Lino venis en la ĉambreton de sinjoro Stannarius apud la apoteko por aranĝi la tablon por la princa vespermanĝo, alportis salon, pipron, tranĉilon kaj forkon, kaj li jam imagis, kiel li distranĉos la omaron. Sed Lino ne revenis kaj ne alportis la omaron. Pro la ega apetito je la bongusta omaro li sentis jam enuon inter la

blankaj ujoj kun „Ipecaguano“ kaj „Rhabarberossa“. Ĉar Lino tiel longe forestis, li fine kuris al la kuirejo kaj singardeme malfermis la pordon.

Jen staris Lino ploreganta kaj insultis laŭte:

„Tia infama orakolo, tia malbenita pasamentaĵo!“ Kaj dume ŝi staris ĉe la tablo, havante antaŭ si la omaron kaj la cirumilojn por botoj kaj cirumis la omaron per la broso, por ke ĝi refariĝu nigra kaj nenion malkaŝu pri ŝia sekreta fianĉineco.

Karlo Stannarius preskaŭ falis teren pro ridegado, li apogis sian dorson al la kuirejpordo kaj kriis: „Ho, Lino, se vi okaze venos inter aron da ŝafoj, faru antaŭe signon sur vin, por ke vi poste rekonu vin inter ili!“ kaj li ridis tiel, ke estis aŭdebla tra la tuta domo, ke ankaŭ alvenis sinjoro Bok por vidi, kio okazis, kaj li kunridis, kiam li aŭdis la historieton kaj vidis la nigre cirumitan omaron.

„Nu“, diris li, „ridinda tio estas, ke Lino efektive kredas tian sensencaĵon; sed vi ankaŭ ricevis vian punon, sinjoro Stannarius. Pro via petolemo vi tiun ĉi fojon perdis la omaron!“

Pri tio ne jam ekpensis la farmaciisto, kaj lia vizaĝo tre longiĝis. Ne, cirumitan omaron li tute ne volas manĝi.

„Nu, konsolu vin“, diris sinjoro Bok, kiu legis de lia vizaĝo, kion li nun pensas. „Nia mortinta praavo Adamo estis ja same scivola kaj havema kiel Evo, li tro multe aŭskultis ŝin, kaj de tiu ĉi tempo ni devas rigardi la pa-

radlizon de ekstere. Adamo ricevis anstataŭ la paradizo antaŭtukon. Multa tio ne estis, sed tamen io, kaj por vi ankaŭ restis lometo; mi alportis por vi ion kroman. Lino, vi ja scias — —, sed nun venu, sinjoro Stannarius, ni tie ĉi ne bezonas resti, virino ĉie volonte vidas la virojn, nur ne en sia kulrejo.“

La maljuna sinjoro reiris en sian ĉambron, Stannarius iris en la apotekon, kaj Lino preparis la kompenson. Si tranĉis panon kaj ŝmiris ĝin per butero, kaj sur teleron metis grandan, fumumitan angilon, kiun sinjoro Bok ankaŭ dediĉis al sia farmaciisto. Estis angilo tiel dika kaj longa kiel hundovipo, grasa blanka angilo; la koro ekĝojas ĉe tia ekvido, kaj la homo forgesas pri ĉiuj teraj mizeraĵoj.

Karlo Stannarius sidis ĉe la tablo, atendante la venontan ĝojon, kaj klaketis per la tranĉilo, kiun li — kiam poeziemo ekkaptas lin — nomas sian fer-fianĉinon. Nun li kantetis antaŭ si:

Vi glavo en la dekstra mano,

Vi tranĉos tuj en ŝink' kaj pano.

Nun li aŭdis, ke la pordo malfermiĝas, sed li ne vidis, ke Hajdi suprensaltas sur Linon, ĉar la hundo certe jam antaŭe volis havi sian parton de la vespermanĝo, kiam ĝi flaris fumumitan angilon.

„Hoha!“ kriis Lino pro ektimo, kaj la angilo glitis de la telero. Hajdi tuj volis kapti ĝin, sed ricevis tian puŝon de la kalkanumo de Lino, ke ĝi turniĝis ronden; ĉar Lino havis ĉe sia korpo brakojn kaj piedojn, kiuj estis de

bona speco, kaj se iu ricevis per ili ekbaton inter la ripoj, li ĉesis ridi. Lino havis tiom da spiritĉeesto, ke ŝi per la sama piedo, en la sama momento, ŝovis la angilon sub la apotekan tablon por recept-skribado, kaj tio estis ĝustatempe farita, ĉar Hajdi tuj realkuris kaj ekscitite bojis en la direkton, kie ĝi flaris la angilon, kaj Lino malbenis la hundojn de la tuta mondo, kiam ŝi alportis la buterpanojn en la ĉambreton de sinjoro Stannarius, kie li ludis kun sia ferflancino.

„Pro kio la hundo tiel bojas?“ demandis li.

„Orakolo tio ne estas“, respondis Lino, kaj denove ekpensis pri la historio de la unua peko en la paradizo, tiu historio ĉirkaŭiris en ŝiaj pensoj de post la konsolaj vortoj de sinjoro Bok, kaj nun ĝi staris antaŭ ŝiaj okuloj kun ĉiuj detaloj. „Ne“, diris ŝi, „orakolo tio ne estas. Jen io ensaltis kun mi tra la pordo de la apoteko, kaj tio ŝajnas al mi esti vipero, sufiĉe granda serpento.“

„Rapide for la hundon, por ke ĝi ne estu mordata!“ kriis Stannarius, kiu en la plej malfacilaj situacioj ne perdis la konscion, kaj nun proprapiede saltis supren sur la apoteko-tablon kaj kriis „helpu“!

„Jen vidu“, pensis Lino forirante, „tion vi ricevis por via orakolo!“

Sed en la koridoro ŝi haltis kaj rigardis tra la koridora fenestro en la apotekon kaj vidis, kiel la farmaciisto super la tablorando explore rigardis, kie la serpento estas. Tiu ĉi ne moviĝis, tial li tre singardeme reiris mal-

supren de la tablo, kaj ekpreninte la plej pezan pistilon, li klinis sin por rigardi la monstron. Kaj nun li klare vidis la voston de la danĝera fibesto, kaj li tuj sciis, kion oni devas fari en tiaj cirkonstancoj kaj en tia situacio.

Ĉu ekpreni? Ne, por tio li ja ĝentile dankas, li ne volas esti mordata. Ne! Se nur la besto ne forkuros, li ja scias, kiel regali ĝin! Sur la piedfingroj li iris al la boteloj, kie estas konservata veneno, kaj konstante rerigardante, ĉu la serpento ne kuras post li — dank' al Dio, ne! — li prenas malsupren la grandan botelon da kloroformo, eltiras la ŝtopilon kaj singardeme rampas al la tablo. Efektive, tie ankoraŭ kuŝas la fibesto, kvazaŭ ĝi intencus ekloĝi tie ĉi.

„Preta al batalo! Kun plenvaporo antaŭen!“ kriis li, kaj pliĉ-plaĉ la serpento ricevis en la vizaĝon verŝon da kloroformo, per kiu oni bone povus liberigi de la teraj suferoj tutan regimenton da soldatoj.

Li saltis malantaŭen kaj malfermis rapidege pordojn kaj fenestrojn. Lino staris ekstere kaj tenis sian korpon pro ridegado, kaj kiam ŝi iom rekonscliĝis, ŝi alvokis sinjoron Bok, por ke li savu sian farmaciiston el tiu mortodanĝero.

Sinjoro Bok ĵus venis en la momento, kiam Karlo Stannarius per bastono penis eligi la serpenton el sub la tablo, kaj li kiel ankau Lino vidis, ke Karlo tenas en la dekstra mano la pistilon pretan por ekbato.

Sed li ne ekbatis, kiam la fumumita angilo aperis. Lino nun prenis ĝin ĉe la vostpinto, kaj tenante ĝin for de si, pro la bona kloroformodoro, ŝi forportis ĝin. Hajdi nun ankaŭ ne plu volis ĝin, ĝi plene perdis apetiton je fumumita angilo, precipe por tiamaniere odoranta frandaĵo.

Sinjoro Bok, starante en la ĉambreto, ne povis fari ion alian ol ridi kaj ridi, ĝis kiam li fine forviŝis la larmojn el la okuloj kaj diris:

„Tion Lino al vi bone repagis! Ho, griza kateto! Tiamaniere vi tre rapide perdis ĉion, kion mi alportis al vi de la Norda Maro! Vi ankoraŭ ofte pensos pri la kloroformita angilo kaj la cirumita omaro, se vi ree intencas petole mokadi servistinojn!“

La bastono*)

„Tio certe fariĝos gaja edziĝo-festo“, diris la vigla sinjoro pastoro al sia preĝej-servisto, kiam ili posttagmeze ĉirkaŭ la tria horo iris sur la strato. „Tie ni ricevos kafon numero tri!“

La preĝej-servisto demande rigardis lin.

„Ĉu vi ne konas la tri specojn de edziĝo-festa kafo?“ demandis la pastoro, kaj super lia gaja vizaĝo flagris brileto, kiu ĉiam tie aperis, se ŝerco volis eliri el la buŝo. „La unua speco estas kafo, la dua estas fikafo, kaj la tria estas fikafaĉo. La stomako tuj laŭte ekkrias, kiam ĝi nur aŭdas la vorton fikafaĉo!“

La preĝej-servisto ridis, kaj la pastoro vid-eble estis kontenta, ke li trovis komprenon por sia ŝerco. Ili eniris la „Transkapiĝo-straton“, kiu estis la lasta el la postaj stratoj de la malnova urbo. La urbo staras sur altaĵo kaj iam estis malgranda fortikaĵo, kaj tiuj lastaj stratetoj ĉirkaŭ la urbo estas malvastaj kaj malglategaj, kaj la domoj tie aspektas mizere. Tiuj ĉi domoj estas unuetaĝaj ĉe la strato, sed de malantaŭe duetaĝaj, ĉar ili estas konstruitaj sur la deklivo. Malsupre, en la teretaĝo, loĝas ĉiuspecaj malriĉuloj, vidvinoj kaj kripluloj,

*) El la libro „Schwänke und Skizzen“, eldonita de Bruncken & Cie., Greifswald.

taglaboristoj kun multaj infanoj, kaj tie loĝas ankaŭ la gurdisto Peplin, ĉe kiu hodiaŭ edziĝo estos festata.

Kiu volas eniri tiun subteraĵon, devas paŝi tra malvasta irejo inter la domoj sur danĝerplenaj ŝtonŝtupoj malsupren kaj devas treege atenti por ne fali.

„Estas eble speco de ĉifonula edziĝo!“ diris la preĝej-servisto, kaj la pastoro faris moveton per la kapo kaj mano, levetis la ŝultrojn, simile kiel oni faras ĉe komercisto, se oni volas vidigi, ke la prezo por iu objekto estas iom tro alta.

„Iun havaĵon la homo tamen devas posedi, ĉar alie li certe ŝparus la kostojn de hejma solenigo de l' edziĝo.“

Kiam ili fine atingis la strateton, kiu kondukas malsupren al la loĝejo de Peplin, ili vidis lin tie staranta kun sia gurdo, kaj la preĝej-servisto eltiris sian poŝtukon por kaŝi en ĝi la ridon, kiam la viro nun komencis ekludi: „Mi estas la malgranda poŝtveturigisto“. Kaj nun marŝis Peplin antaŭ la ekleziuloj. Estis la unua fojo, ke oni per tia maniero solenis illan eniron en edziĝofestan domon. Nur la katoj en la kortoj de l' najbaraĵo ne havis komprenon por tiel signifoplena momento, pro la sonoj ili provis rampi supren sur la muroj.

En la ĉambro la pastoro petis la maljunan viron, ke li nun ĉesu ludi, kaj al la preĝej-servisto li mallaŭte diris, ke ili nun forlasos la enkondukan kantadon: „En ĉiuj miaj faroj“,

ĉar ili ne volis konkuri kun la „malgranda poŝtveturigisto“ de Peplin. Do la edziĝo estis solenigata. La edziĝofestaj gastoj, nome sinjoro balailfaristo Adam Kraus kun edzino kaj sinjoro seĝoflikisto Snippel kun edzino, ambaŭ kun granda amaso da infanoj, pie aŭskultis, kiam la sinjoro pastoro solene kunigis Martinon Tune kun Anna Peplin. La sinjorinoj pro kortuŝo purigis la nazon per slaj nudaj fingroj, la viroj ekmaĉis novan buleton da tabako, kaj la preĝej-servisto ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, kie tiuj subteruloj loĝadas. Mizere, tre mizere estis tie, tamen iel purece ĉio aspektis, kaj por la arto oni ankaŭ ion oferis. Sur la muro, antaŭ nelonge freŝe kalkigita, estis alnajlita duona dekduo da bildfolioj el Neuruppin-a skolo (presita kaj aĉetebla ĉe Gustav Kühn), kiuj prezentis produktaĵojn el la lasta milito inter Ruslando kaj Japanujo, kie la ruĝa fajro elsaltis el la kanonoj kaj granda amaso da kanonkuglegoj kaj rusaj pledoj saltis en la aeron. Sur la sama muro pendis de najlo dika kverka bastono.

Kiam la pastoro estis dirinta „Amen“, ĉiuj sidiĝis ĉe la kafo-tablo, kaj sinjorino Peplin enverŝis. Unue al sinjoro pastoro kaj sinjoro preĝej-servisto, poste al la junaj geedzoj kaj fine al la aliaj gesinjoroj.

„Mi jam tute pretigis la kafon“, diris sinjorino Peplin, „estas jam lakto kaj sukero en ĝi, prenu, sinjoro pastoro, la kuko, klu staras dekstre de vi, estas la plej bona.“

Ili ĉiuj prenis, kaj kiam la pastoro prenis de la dekstra kuko kaj prove ektrinkis de la kafo, li tuj remetis la grandan tason. Li jam trasuferis multajn kafojn, sed io simila ankoraŭ ne venis sub lian nazon kaj en lian buŝon. Pro malnova sperto li nun entrempis la kukon, kaj pacience li manĝis kaj trinkis kiel viktimo de sia ofico, la preĝej-servisto same.

„La kafo estas forta!“ diris Peplin, afable movante la kapon kontraŭ la pastoro. „Mi ja diris al mia edzino, ke ŝi bone preparu ĝin! Estas ja la festotago de mia Anna!“

„Mi enmetis ja ankaŭ du paketojn da cikorio!“ diris sinjorino Peplin.

„Nura kafo ja estas malsaniga“, aldiris la pastoro. „Ĝi pereigas la homon. Estas en ĝi veneno, kiu estas nomata kofeino, tial la kafo malsanigas la homojn kaj faras ilin nervozaj!“

„Nu, pri tio mi ne povas miri“, opiniis modeste Adam Kraus, la balailfaristo. „Venenaj bestoj laŭdire estas ja ĉie, ekzemple triĥinoj kaj tenioj. Kaj la mikroskopo laŭdire estas ja same danĝeraj kiel la tenioj, laŭ eltrovo de la sciencistoj. Entute tiuj sciencistoj! Mi pensas, se ili ne havus sian sciencan scion, ili estus tiaj ŝafkapoj*), klaj ni estas, sed mi ja eble eraras pri tio ĉi!“

„Ho, kiom ofte la homoj facilanime venigas al si malsanojn kaj mlzeron“, la pastoro rekomencis, kontenta, ke li povis daŭrigi la

*) Germanismo por malsaĝuloj.

parolon pri tiu ĉi temo. „Ekzemple, kiom da homoj pereas pro la brando-trinkado!“

„Jes, jes, sinjoro pastoro“, fervore diris Peplin, „tio estas vera, tion mi ofte spertis dum mia migrado. Brandotrinkanto fariĝas porkhundo¹⁾, kaj porkhundo estas porkhundo, eĉ se li ne pagas al sia tajloro²⁾!“

„Vi certe multon spertis, Peplin!“ diris la pastoro.

„Certe! Tio ja estas natura dum tiel long-tempa vojaĝado! Ho, kiom oni travivas! Mi malsatis, mi sentis malvarmegon, min brulvarm-igis la suno, kaj oni min forpelis. Sed multe pli malbona ol ĉio ĉi estis la tempo, dum kiu mi amikiĝis kun la brando, kiam mi konstante estis ebria, kaj mia stomako ĉluvespere estis en tia stato, kvazaŭ en ĝi estus leporĉaso kun kuregantaj hundoj, ĝis kiam fine tiu ĉi bona amiko savis min!“

„Kiu?“ demandis la pastoro.

„Tie ĉi sur la muro ĝi estas, mia malnova bastono.“

„Rakontu! Kiel tio okazis?“

„Estas mallonga historio, sinjoro pastoro! — Viro de mia profesio devas iri piede, se li volas prosperi kaj zorgi por sia familio. Gurdisto estas malestimata homo, mi tion bone scias, kaj estas por mi honoro, kiam mi povas paroli kun klera homo. Sed mia arto estas

¹⁾ Esprimo por malpurema, en ĉiu rilato malestiminda homo.

²⁾ Signifas: Eĉ se li vivas en sinjora rango.

enspezlga, se lu vivas ŝpareme, li honeste nutras sian familion kaj ne bezonas ŝteli, eĉ povas ion ŝpari. Mi devenas el la malnova tempo, kiam ankoraŭ ne ekzistis asekuro kontraŭ akcidentoj, alie mi ne estus bezoninta iri kun la gurdo. La virbovo sur la herbejo de Henriko Lang elpuŝis per la korno mian okulon, kaj poste la rikolta veturilo frakasis mian piedon, kaj oni devis fortranĉi ĝin. Mi ĉiam estis iom nefortika en la piedoj, kaj al mia ligna piedo kaj la peza gurdo estis necesa fortika bastono. Mi mem tranĉis ĝin por mi en la Stremlow-arbaro; estas juna kverko, kaj la tenilo estas radiko. Dum la migrado mi iam estis iom ebrieta, ĉar, kvankam la drinkado ne estis ĉe mi heredita de la gepatroj, tamen oni lernas ĝin per la tro ofta okazo. Jen ofte oni ricevas senpage glaseton da brando, kaj la homo havas avidan naturon, prenas volonte tion, kion li ricevas senpage, eĉ se tio malutilas al li. Ĉar mi do ne plu povis bone marŝi kaj tamen volis atingi alian urbon antaŭ la nokto, por ke mi matene jam povu gajigi la homaron tie per mia muziko, tial mi iris al la stacidomo por veturi vagonare kaj trovis tie en la atendejo tutan anaron da vilaĝaj laboristoj, kiuj fariĝis tre gajaj, ekvidante min kun mia gurdo kaj tuj igis min ludi, pagante siajn pfenigojn, ĉar, sinjoro pastoro, la simpla homo ne estas avara, se li povas dediĉi ion al ni. Kaj ili ankaŭ enverŝis por mi glason post glaso da brando, ĝis kiam fine mi estis „plenverŝita“ kaj ege ebria. Mi pensas, ke ili nenion malbonan

intencis, kvankam ili tre gajiĝis pro mia kantado; sed ne estas bona amikeco, se unu homo ebriigas alian. La viroj forprenis nun de mi la gurdon kaj mem ludis ĝin tute tiel, kiel la abomenaj stratbuboj, kiuj ankaŭ tuj ĉeestas, se oni ne bone atentis; ili vere ne estas io pli bona ol duonaj simioj. Mi sentis min morte malbone, sinjoro pastoro, tiel multe mi estis drinkinta. Ŝajnis al mi, kvazaŭ en mia korpo oni seninterrompe malfermus kaj refermus pluvombrelojn; mi devis iom iri en la freŝan aeron kaj kunprenis la bastonon. Senkonscie mi zigzage marŝis laŭ la reloj, ĉar estis tute mallume. La luno ne estis lumigita tiun ĉi vesperon, ili forgesis tie supre alverŝi petrolon aŭ ne bone purigis la meĉon. Mi ekpaŝis la relvojon kaj — klak, falis la sinjoro teren, kaj la bastono saltis el mia mano! Nun diru ion, sinjoro pastoro! — Mi kuŝis sur la reloj kaj sciis kaj aŭdis laŭ la bruo, ke la vagonaro alkuregas, mi sentis la danĝeron, vells leviĝi, sed ne povis. La malvarma ŝvito gutis de mi, mi scias tion, mi sentis same, kvazaŭ homo, kiu estas kloroformita per morfino kaj ne povas helpi al si, estis stato pli terura ol tiu de turmentito en la terurkamero. Mi scias ankoraŭ, ke mi — laŭ mia opinio — eldiris mian lastan preĝon: Sinjoro pardonu al mizera homo! tiam mi aŭdis la muĝegon jam proksima, jen ekfajfas la lokomotiva fajfilo, ĝi ne ĉesas fajfi, kaj poste homoj komencas kuradi ĉirkaŭ mi, kaj nun ili ekkaptas min kaj fortiras min de la reloj. Kaj kiu do malhelpis, ke mi

ne estis dispecigita de la vagonaro, sinjoro pastoro kaj sinjoro preĝej-servisto? Tion vi ne divenos eĉ dum via tuta vivo! Mia bastono estis la savinto! La malnova bona bastono elserĉis por si kiel restejon precize la lokon inter la ĉefrelo kaj la longo de la relŝanĝilo tiel, ke ne estis eble, ĝustmeti la relŝanĝilon, kaj la signalo ne leviĝis, tial ne estis libera enveturo por la vagonaro! De tiu ĉi horo mi solene promesis neniam plu trinki brandon kaj ne rompis ankoraŭ mian promeson. Kelkaj homoj diris, ke mi ŝuldas la savon de mia vivo nur al blinda hazardo, sed tia diro estas nur malsaĝa. Al mia bastono mi ŝuldas ĝin kaj al la mano de Dio, kiu ne volis, ke mi eniru la ĉielon kiel ebria porkhundo!"

„Do ankaŭ hodiaŭ oni ne trinkos brandon tie ĉi?“ demandis la pastoro.

„Ne, ankaŭ bieron ne, sinjoro pastoro! Ĉiu ricevos tiom da kafo, kiom li volos (la preĝej-servisto skuis sin), por la sinjoroj mi aĉetis mineral-akvon kaj la sinjorinoj ricevos frukt-sukon en ĝi!“

„La bastonon vi ankoraŭ ĉiam kunportas dum via migrado?“ demandis la pastoro.

„Ne, sinjoro pastoro, nun ne plu! Mi forlasos mian oficon, ĉar mia Anjo ja estas prizorgita; la bastonon ricevos mia bofilo, kiu ja ankaŭ lamas.“

„Ĉu tio estas la tuta doto?“ nepripensinte diris la pastoro, kaj por ripari tion, li aldonis,

„mi nur demandis, ĉar vi diris, ke vi lon ŝparis!“

„Tion ni ankaŭ faris, sinjoro pastoro, ni havas iometon en la banko, sed Anjo ne estos dotita kiel principino de tri landoj, havante nur du ĉemizojn!“

„Do kion ŝi ricevos?“

„Miaj infanoj ricevos la grand-duklandon Mecklenburg kaj la provincon Schleswig-Holstein (Ŝlesvig Holstein)!“

„Kion?“ ekkriis la pastoro, „ĉu vi povas donaci landojn kaj provincojn?“

„Tion mi povas! Mi ankoraŭ ne ,tragurdis' ilin.“

Nova Esperanto-Biblioteko

Noj. 1-4 estas primilitaj publikigaĵoj de Germana Esperanto-Servo, kiuj nun malaktualiĝis.

No. 5. Argus: Pro kio? Internacia kriminalromano originale verkita.

No. 6. Heine, Heinrich: Elektitaj Poemoj. El germana lingvo tradukis Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono.

No. 7. William, P.: Legolibro. la volumo: Internacia Anekdotaro.

No. 8. Hauff, Vilhelmo: La kantistino. Novelo. El germana lingvo tradukis Eugen Wüster.

No. 9. Lessing, Gotthold Ephraim: Natan la Saĝulo. Drameca poemo en kvin aktoj. El germana lingvo tradukis K. Minor.

No. 10. Elin-Pelin: Elektitaj Rakontoj kaj Prozversaĵoj. El la Bulgara tradukis Ivan H. Krestanoff. (En preparo.)

Ĉiuj volumoj estas bele kartonitaj.

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo.

(La kolekto estas daŭrigota.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.

Berlin kaj Dresden

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

Unua serio (elveninta ĝis 1914):

- No. 1. Legolibreto, de J. Borel.
- No. 2. Fabeloj de Andersen, tradukitaj el dana lingvo de Fr. Skeel-Gjörlling.
- No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.
- No. 4. Rusaj Rakontoj, de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.
- No. 5. Don Kihoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pujulà y Vallès.
- No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof.
- No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo de Dro L. L. Zamenhof.
- No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof.
- No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel.
- Noj. 10-11 (duobla numero). Japanaj Rakontoj. El Japano lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.
- No. 12. Reaperantoj. Familia dramo de Henrik Ibsen (1a akto), trad. el norvega lingvo de O. Bünemann.
- No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.
- Noj. 14-15 (duobla numero). Amoro kaj Psiĥo de Lucius Apulejus, el latina lingvo trad. Emilo Pfeffer.
- No. 16. Komerca Korespondo, kunmetis J. Borel.
- No. 17. Konsiloj pri Higieno, tradukis J. Borel.
- No. 18. La Reĝo de la Ora Rivero de John Ruskin, el la angla lingvo tradukis Ivy Kellermann, A. M., Ph. Dr.
- No. 19. Sinjoro Herkules. Unuakta burleskaĵo de Georg Belty, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Botta.
- No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.
- No. 21. Hungaraj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.
- No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandow, el platgermana lingvo tradukis Ella Scheerpeltz.
- No. 23. Hispanaj Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.
- No. 24. La Instituto Milner de Jean Jullien. Trad. el franca lingvo la Lyon-a Grupo.
- No. 25. Noveletoj el la Nigra Arbaro de Hel. Christaller. Trad. el germana lingvo W. Christaller.
- No. 26. La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.
- No. 27. La Patrino de E. Zola. El la Germana trad. J. Šmid.
- No. 28. Elzasaj Legendoj. El germana lingvo tradukis Charlotte Pulvers.
- Noj. 29-31 (triobla numero). Subla Neĝo. Taglibro de juna loĝanto de la Jura-montaro de J. J. Porchat, el la Franca trad. J. Borel.
- No. 32. La Amkonkurantoj. Triakta komedio, originale verkita de Reinhold Schmidt.

Prezroj laŭ nia plej nova katalogo. La kolekto estas daŭrigota.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel GmbH.,
Berlin kaj Dresden